Unu el la redaktoroj skribis al ni, ke la materialo ricevita el Nord-ameriko ne sufiĉas, ĉar la temoj kaj devenlokoj de la verketoj ne estas sufiĉe variaj. Proksimume mil artikoletoj kaj cent infanaj desegnaĵoj alvenis el la ŝtatoj California, Florida, Illinois, Massachusetts, Michigan, Missouri, New Jersey, New Mexico, New York, North Dakota, Ohio kaj Pennsylvania. New York, Chicago, Philadelphia, Dayton kaj Tampa ŝajnas esti la solaj grandaj urboj, el kiuj artikoloj estas senditaj al Tokio. Oni bezonas multe pli grandan nombron de kiel eble plej variaj artikoletoj, precipe el la ŝtatoj kaj regionoj ĝis nun ne reprezentitaj.

Eble kelkaj el niaj membroj kaj gelegantoj ne kunlaboris, ĉar ili legis limdatojn, kiuj ŝajnas indiki, ke estas jam tro malfrue. Ne estas tro malfrue. Oni ankoraŭ danke akceptas taŭgan materialon.

La eldonejo Heibonsha kaj ĝiaj redaktoroj uzas Esperanton por diskonigi la projekton kaj kolekti materialon. Tamen *ne estas necese traduki anglalingvajn artikolojn en Esperanton*, ĉar la eldonejo havas sufiĉe da tradukistoj, kiuj komprenas la anglan lingvon. Artikoletoj verkitaj en angla lingvo povas esti sendataj tiaj, kiaj ili estas. Alivorte: Sendu en Esperanto artikoletojn originale verkitajn en tiu lingvo! Artikolojn en angla lingvo—kaj el Kanado ankaŭ en franca lingvo—sendu en la naci-lingva originalo!

La plej dezirataj temoj estas: la lerneja kaj hejma vivo de la infanoj, la laboro de iliaj gepatroj kaj najbaroj, karakterizaj okazaĵoj en la urbo aŭ vilaĝo, kie la infano loĝas. Kvankam la libro estas geografia, la eldonantoj deziras, ke la verketoj ne enhavu ĝeneralajn klarigojn, kiajn enhavas geografiaj lernolibroj, sed personajn travivaĵojn de la infanoj kaj raportoj pri konkretaj faktoj. La infanoj skribu ne pri sia scio, sed pri siaj spertoj, ne pri io, kion ili legis en libro aŭ lernis en lernejo, sed pri io, kion ili vidis, aŭdis, ĝuis, suferis, sentis, pensis aŭ mem faris. La priskribo estu laŭeble plej konkreta kaj detala. Ĝi povas esti tute simpla. Bonaj ekzemploj estas troveblaj en la informa bulteno *La Infanoj de la Mondo*, de kiu ĝis nun aperis 5 numeroj. (Specimenoj estas haveblaj de EANA; prezo dek cendoj.)

Oni povas ankaŭ sendi numerojn de lernejoj gazetoj, kiuj enhavas artikoletojn verkitajn en la maniero priskribita. Oni preferas artikolojn de infanoj inter la aĝoj de 9 kaj 15.

Se vi havas geamikojn, kiuj estas instruistoj aŭ gepatroj de infanoj 9-15-jaraj, instigu ilin al kolektado de taŭgaj artikoletoj. Sendu ilin kiel eble plej rapide al la jena adreso: “*La Infanoj de la Mondo*”, Eldonejo Heibonsha, No. 4, Yonbancho, Chiyodaku, Tokyo, Japanujo.





DON GIOVANNI KAJ MI

George H. Perrine

Okaze mia edzino diras al amikino; "Mi devas gardi Robertson sub la okulo. Li havis etan inklinon al rusaj balletistinoj." Ŝi ridetas al mi; kaj, miavice, mi ridetas ankaŭ, sed kun aspekto iomete mistera kaj romantika. Ankaŭ ridetas la amikino, kompleze penante kaŝi sian miron, ke sub tia eksteraĵo kiel la mia povus embuskiĝi ulo tiel danĝera.

Mi devas konfesi, ke mia eksteraĵo ne estas tro impona. Mia vizaĝo estas neniel rimarkinda; ĝi havas decan nombron da trajtoj ordigitaj laŭ la kutimo, plialtigantan harlinion, okulvitrojn, kaj lipharojn. Rilata al la cetero, mi havas ekipaĵaron normalan – brakojn kaj aknojn kaj fingrojn kaj kruojn kaj renojn; tio ĉio estas kunligita per ĝuste sufiĉe da muskoloj, histo, haŭto, kaj ostoj por ebligi al mi iri malrapide de punkto A ĝis punkto B. Iom maldiketa, mi ne aspektas bone en naĝkostumo, sed, ĉar mi ne scipovas naĝi, tio ne multe gravas. Mi tute ne posedas la muskolaron tremetantan tiel admiratan de la virinoj. Resume, mi ne estas okulfrapa.

De post multaj jarcentoj, la filozofoj senĉese gratas la kapon pri la sennombraj misteroj, kiuj nin ĉirkaŭas. Kial la pomoj falas malsupren? Kial la terglobo turniĝas? Kial la puloj estas nigraj? Kaj laŭ kia sistemo la virinoj elektas siajn edzojn? Al tiuj kvar demandoj, eĉ hodiaŭ la respondoj estas ankoraŭ necertaj. Sir Isaac Newton elpensis tiel nomatan leĝon naturan por respondi al la unua; la astronomoj persistas argumentadi pri la dua; Bernardin de St. Pierre, konsiderante la trian, firmdiris, ke Dio kreis la pulojn nigraj, por ilin fari pli videblaj kontraŭ la blanko de la littuko; rilate al la kvara, neniu – nek eĉ D-ro Einstein – kapablas ekspliki ĝuste kial virino bela kaj inteligenta elektas kiel edzon ekzempleron preskaŭ subhoman.

Tiu lasta demando ofte maltrankviligas min, speciale kiam mi staras antaŭ spegulo. Ĝi min maltrankviligis eĉ dum la mielmonato. Iun tagon, mi pensis, la skvamoj forfalos de sur ŝiaj okuloj, kaj dum la matenmanĝo ŝi min rigardos longe kaj zorge. Kia, ho! kia estos la rikolto? "Jen bedaŭrinda impulso", ŝi pensos, "kiu min instigis edziniĝi al tia kreitaĵo!"

Mi antaŭvidis la danĝeron. Estos nepre necese, mi decidis, fabriki por mi karakteron sufiĉe romantikecan por kontraŭbalanci mian aspekton eksteran. Mi devos planti en ŝian menson la konvinkon, ke ŝia edzo estas ulo admirinda, kies ĉarmon evidentan aliaj virinoj facile perceptas, kaj kies kariero pasinta postlasis nombron da koroj se ne rompitaĵoj, almenaŭ iomete fenditaĵoj.

Tamen, kiel ajn inda estu la celo de tia programo, oni estu ĝentil-homo kaj sekvu la jenajn konduk-regulojn:

1. Neniam, ho! neniam oni mencienu nomojn identigeblajn. Lasante la nuran kavalirecon aparte, oni gardu en la menso la fakton, ke ju malpli da detaloj oni donas, des pli oni atingas la ver-similecon.
2. Ĉiam, ho! ĉiam oni sin limigu al la vero neornamita. Tiu simpla antaŭzorgo evitas la konfuzon kaj la kontraŭdiraĵojn kiuj tro ofte enkaptigas la rakontiston neprofesian.

3. En kelkaj kazoj specialaj (kiel en la dua sekvonta), oni aldonu ne sole la veron neornamitan, sed ankaŭ ĉiujn detalojn. Tiaj esceptoj postulas juĝkapablon tre delikatan.

Mi ilustros la procedon sekvindan per du ekzemploj zorge elektitaj. La jena bone montrus la priskribitan teknikon sub la unua regulo supre:

La edzino kaj mi diskutadis najbarinon, kiu kutime iĝis histeria kiam ajn ano de ŝia familio manifestis la plej etan emon kontraŭstari ŝiajn volojn.

"Tio min rememorigas", mi diris, "pri fraŭlino sur la vaporŝipo *Suffren*. Iun nokton, en meza Atlantiko, kiam ni estis kune sur la boatferdeko, ŝi havis subitan atakon de histerio. Mi devis ŝin rekonduki al ŝia kajuto".

La edzino min ekrigardis kun nove vekita intereso. "Sed kial?" ŝi demandis. "Kion vi faris al ŝi?"

"Ho --", mi paŭzis, kaj kun aplombo ekbruligis cigaredon. "Nenion".

Silento. De tempo al tempo mi povis senti ŝiajn rigardetojn. Baldaŭ ŝi supreniris la ŝtuparon kaj revenis malsupren kun miaj pantofloj. Ĉiuj virinoj, mi supozas, sekrete admiras viron kies karaktero havas flankon brutan.

Estas eble, mi konfesas, ke miaj vortoj estigis impreson iom falsan. Ĉu tio estis mia kulpo? Ja estas vere, ke tiu fraŭlino kaj mi estis kune sur la boatferdeko. Ja estas vere, ke ŝi havis atakon de histerio. Ja estas vere, ke mi ne estis ion farinta. Ankaŭ estas vere, ke du minutojn post nia alveno sur la boatferdeko, kiam ni troviĝis ĉe la piedo de la antaŭa fumtubego, la ŝipo eniris en iom da nebulo; ĉe kio, iu azeno en la pilotejo subite ekfunkciigis la sirenegon: BLU-U-U-U-U-UTTTTT!

Tute ne atendinte tian surdigan eksplodon de sono, la fraŭlino kaj mi eksaltegis almenaŭ unu metron rekte supren, kiel paro da kapridoj ekterurigitaj. Post momento, kiam la supro de mia kranio revenis al sia kutima loko kaj miaj okuloj ĉesis sian svingadon, mi rekunigis la nervan sistemon kaj ĵetis ĉirkaŭrigardon. Jen la kompatindulino, ridanta, krieganta, en stato de duonkolapso. Vane mi penis ŝin kvietigi. Fine mi devis ŝin porti reen al ŝia kajuto, kie mi pasigis bedaŭrindan duonhoron kun ŝia patrino. Tiu sinjorino, ĝis la fino de la vojaĝo, persistis min rigardi kiel specon de serpento.

Kiel mi menciis antaŭe, estas iuj okazoj kiam la edzo devas produkti rakonton plene detalitan. La sekvonta ekzemplo estas tia kazo. Ĝi ankaŭ bone ilustros gravan teknikajeton: oni atendu konvenan okazon, antaŭ ol fari ian aludon al sia glora pasinteco. Neniam oni eltrenu tian temon sen antaŭa preteksto. La afero devas fali nature en la konversacion.

Iun vesperon la edzino foliumis la paĝojn de revuo, paŭzante de tempo al tempo por rigardi reklamon. Sciante ke mi ĉiam havas iom da malforteco je la fotografaĵoj de belaj virinoj, ŝi diris: "Jen unu tre alloga. En lita vesto, ankaŭ".

"Permesu al mi vidi.... Hm.... Vin mi preferas ol ŝin!"

"Sensecaĵo. Nu, rigardu. Ĉu vi ne ŝatas tiun litan veston el nigra punkto?"

"Ho, mi ne scias. Ŝi devus esti pli blonda".

"Ĉu vere?"

"Helblonda -- kiel rusa baletistino kiun mi konis. Ŝi estis vere bela en lita vesto el nigra punkto".



"Ho! Alia konkeraĵo!"

"Tute ne! Nur surŝipa amikino, kiun mi ---"

"Iom intima, konfesu!"

"Aŭskultu. Mi eksplikos la aferon. Iun tagon, sur la vaporŝipo *Parizo*, mi invitis tiunfraŭlinon al la tiunokta balo por la pasaĝeroj. Dum la posttagmezo ni komencis havi iom da vento, kaj la ŝipo dancis kaj balanciĝis sufiĉe por malkvietigi la stomakon de naŭzemulo."

"Kaj vi", demandis la edzino, "kiel vi fartis?"

"Bonege! Ĉe la vespermango, mi hakis vojon tra la mangokarto kiel D-ro Livingston tra la ĝangalo!"

"Sed la baletistino ---"

"Ŝin mi ne vidis ĉe la vespermango."

La edzino ekridis. "Ho! Mi komencas kompreni!"

"Tia ideo ne frapis min. Kiam oni havas dudek jarojn, oni ne estas tre pensema, speciale pri aliuloj. Do, je ĉirkaŭ la oka, mi iris al ŝia kajuto kaj frapis sur la pordon. Mi aŭdis specon de sono sufokita, kiun mi prenis por ia rusa vorto signifanta 'eniru'. Jen la baletistino, vestita per tiu afero el nigra punto, kaj kuŝanta sur la lito. Apud ŝia kapo troviĝis malgranda ujo, kiun ŝi pretenis konvulsie. Ŝi lamentadis angle, france, kaj ruse; ŝi ĝemadis; ŝi vekriadis. Nu, kiel vi scias, mi estas vigla ulo. Mi bezonis nur kelkajn momentojn por kompreni, ke la kompatindulino havas la marmalsanon".

"Kaj kion vi faris, Don Giovanni mia?"

"Kion mi ja povis fari? Mi tute ne povis ŝin forlasi. Mi tenis al ŝi la kapon --- kaj samtempe la ujeton, kiun ŝi plenigadis kaj mi malplenigadis, dum kvar horoj kiuj ŝajnis senfinaj. Kia sperto! Fine, ŝi dormis. Kun tia delikateco kiam oni uzus por forigi muŝon de sur dormanta Venuso, mi silente malaperis, marŝante sur la pintoj de la piedoj".

La edzino ridis ĝis venis la larmoj. "Mi gratulas vin!" ŝi diris tuj kiam ŝi povis denove spiri. "Jen rakonto bela!"

"Kaj plene vera!" mi rapidis aldoni.

"Tion mi kredas!" Ŝi min rigardis, kaj palpebrumis signifoplene.

"Nu!" mi protestis. "Kiam mi diras, ke estas la nura vero ---"

"Jes, jes, kompreneble! Sed kian karieron vi ja havis!" Ŝi ridis denove. "Karulo mia, vi estus povinta doni lecionojn al Don Giovanni!"

Nu, la du ekzemploj, kiujn mi ĵus donis, sufiĉos por montri la ĝeneralan metodon. La fundamenta principo estas simplega. La edzinoj, preskaŭ senesepte, rifuzas kredi, kion ajn rakontas la edzoj pri siaj spertoj kun aliaj virinoj. Do, kiam edzo fanfaronas pri siaj junaĝaj faritaĵoj, lia edzino pensas en si ke li evidente mensogas; ŝi supozas, ke la kompatindulo neniam kapablis logi eĉ muŝon; kaj pli malpli baldaŭ ŝi komencas opinii, ke li estas nur azeno. Sed male, kiam edzo modeste persistas aserti, ke lia pasinteco estas enuiga kaj senincidenta, lia edzino iĝas certa, ke la kontraŭo estas vera.

Tio ĉio donos al vi ian ideon pri la tekniko, kiun oni devas uzi. En mia propra kazo, la edzino estas firme konvinkita, malgraŭ miaj neoj ripetitaj, ke mi estas korrompisto. Kompreneble, mi bedaŭras, ke el miaj vortoj rezultas tia trompaĵeto; sed almenaŭ ŝi havas la opinion, ke ŝi ne edzigis nuran orangutangon.

Tiuj aludoj al Don Giovanni, kiel vi povas supozi, ne donas komparon

tute ĝustan. Tion mi scias, ĉar mi ĵus esploris la aferon. Se vi volas preni la penon akiri la tekston por la opero *Don Giovanni* de Wolfgang Amadeus Mozart, vi trovos, ke mia edzino iomete troigis miajn faritaĵojn. Nelonge post la komenco de la unua akto, la servisto Leporello kantas la famegan *katalogkanton*, en kiu li detale priskribas la diversajn konkerajojn, faritajn de lia mastro Don Giovanni.

Eble vi ŝatus havi precizan komparon inter li kaj mi. Ĉi sube vi trovos tabelon:

<i>DON GIOVANNI</i>	<i>MI</i>
100	Francujo 0
--	Belgujo 0
640	Italujo --
231	Germanujo 0
91	Turkujo --
--	Atlantika Oceano 0
<u>1,003</u>	<u>Hispanujo</u> --
2,065	0

Kiel vi povas facile vidi, mi faris unu gravan fundamentan eraron: Mi neniam iris Hispanujon.

Artikoloj kaj Leteroj al la Redaktoro pri Esperanto aperis lastatempe en la jenaj ĵurnaloj pro iniciato de koncernaj membroj de EANA: "Harvard Crimson" kaj "Boston College Chemical Bulletin" (*Graham Fuller*); "Morristown Daily Record" kaj "The Dover Advance" (*Henry Kruse, Jr.*); "Indianapolis Times", "Indianapolis Star", "Chicago American", "Chicago Sun-Times" (*Robert W. Powell*); "Gwiazda Polarna" (*A. Bartosz*) pri apero de Pan Tadeusz en Esperanta eldono; "Nowy Swiat" (*A. I. Rogus*), reklamo kaj Pasko-festaj bondeziroj de EANA.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) nomis novan reprezentanton por Usono, S-ron Donald R. Broadribb, 406 W. Vermont St., Urbana, Illinois. Depost nun, Protestantaj Esperantistoj turnu sin al li por detaloj pri la organizo. Li volonte donos al ĉiu interesato informojn kaj specimenan ekzempleron de la gazeto "Dia Regno".

Inter nia Esperantista familio: D-ro kaj S-ino W. Solzbacher anoncis la edziniĝon de sia filino *Josephine* al S-ro *Patrick E. Kennon* la 25-an de Novembro en Glen Echo, Maryland. *Ges-roj Harry Harrison* sendis tre spritan anoncon pri "nova aldono" en sia familio: naskiĝo en Majo 1955 de unua filo *Todd*. *Ges-roj David Jagerman* raportis pri la naskiĝo de dua filino *Barbarino* la 18-an de Januaro. *Ges-roj M. E. Muttart* sendis anoncon en formo de bileto por la "Cikoniteatro" pri "nova prezentado", kiu prezentas novan stelulinon *Susanne*, novan filineton naskiĝintan la 13-an de Marto.

1956 Kongreso de EANA en Detroit: De 29a de Junio ĝis 2a de Julio en la bela Hotelo Wolverine, kun malaltigitaj prezoj por loĝado. Spertaj gejunuloj aranĝas alogan programon, pere de Bernard W. Haag kaj grupo en Detroit, kun helpo de Jon B. Willarson kaj Cecile Pollatz de Milwaukee (kiuj helpis aranĝi la Kongreson tie 1955). *Nepre ĉeestu!*

LA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

Komentoj de Donald R. Broadribb

Responde al recenzo pri IVE en la antaŭa numero de AE, S-ro Broadribb, ĉefa kunlaboranto de S-ro Azorin, donas komentojn. En la ĝenerala disputado rilate al IVE, ni ankaŭ ricevis leteron de S-ro Azorin, montranta ke la ĉefa kompilinto de Plena Vortaro, S-ro Waringhien, kiu plej aktive kontraŭas la enhavon de IVE, mem faris multajn similajn 'novaĵojn' en la Suplemento de Plena. Eble senpartiaj kompetentuloj devus esplori la lingvajn tendencojn en ambaŭ verkoj. —La Redaktoro.

EN la januar-februara numero de AE, sur paĝoj 22-26, Doktoro Solzbacher bonvolis recenzi la novan libron *Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Ĉar skribis la recenzo sperta esperantisto, kutimiginta al kritika legado kaj uzado de teknikaj verkoj, la recenzleganto ne tiel sperta kaj ne kutimiginta al la teknikaĵoj de esperantologio sendube miskomprenis kelkajn el la deklaroj de D-ro Solzbacher.

Unue, mi deziras memori al la legintoj, ke la proporcioj estas iom neklaraj. IVE (unua volumo) konsistas el ĉ. 660 grandformataj, dukolonaj paĝoj po pli ol 100 linioj. Dum diversaj kritikindaĵoj troviĝas (kaj neniu tion neas), ili estas serĉendaj en la teksto, ili ne frapas la okulojn de la uzanto kiu uzas la libron nur kiel konsultilon.

Ĉar IVE intenciĝis por esperantistoj, ne lernantoj aŭ komencantoj, la aŭtoroj opiniis ke ne estus necese fari bildon "de dolĉeco kaj lumo" pri la lingva stato de Esperanto. Kiu serĉas libron por trovi rekomendojn, tiu konsultu unu el la bonaj lernolibroj, ekzemple tiun de Butler. IVE estas por la sperta esperantisto, kiu konscias pri la diversaj fakcioj, kvereloj, malakordoj, kaj problemoj de nia lingvo.

Unu el tiuj malakordoj estas la t.n. teorio de radikaj kategorioj. Laŭ ĉi tiu teorio, ĉiu radiko esperanta apartenas al gramatika klaso (substantiva, verba, adjektiva...). *Komb*, laŭ la teorio, ne estas neŭtrala, ĝi estas verba radiko. Laŭ ĉi tiu teorio, la vorto "kombiĝi" povas signifi neĉion pli ol "iĝi komb(i)". Ĉar *komb* ne estas, kaj sen aldonita afikso ne povas esti, adjektiva, substantiva, kc., sen tia afikso "kombiĝi" povas esti nur "iĝi kombi". Simile, se *fid* estas verba, "fidiĝi" ne povas signifi "iĝi fido" sed nur "iĝi fidi", kc.

Konsciante pri ĉi tiu fakto, kaj ankaŭ pri la fakto ke la aŭtoroj de IVE malakordas inter si pri la akceptindeco de la teorio de radikaj kategorioj (mi mem ĝin ne akceptas), IVE faris kompromison. Ĉe la -iĝi vortoj ĝi indikas du (foje tri) difinojn: 1. -iĝi -i, por indiki la verban kategorion de la radiko, kiam ĝi estas tia; 2. -iĝi -ata, por indiki la normalan sencan (aŭ -iĝi -a, -o, kc. laŭ la senco); 3. sin -i (kie tiu signifo eblas). IVE antaŭsupozas ke la leganto estas sperta esperantisto, kiu konas la lingvon, kaj ne uzos sensencaĵon. La unua difino estas, do, ne por efektiva uzon (neniu iam diros "mi volas iĝi rapidi"), sed por indiki, por tiuj kiuj akceptas la teorion de kategorioj, la kategorion de la radiko.

Simile, ĉe *ĉies* la diversaj formoj estas teoriaj, donitaj por sugesti al la sperta leganto interesan aspekton de nia lingvo. Se "ĉies" = de ĉiu, do "ĉieslaŭdata" = laŭdata de ĉiu. Tio estas *ebla* uzo, en la kadro de nia lingvo. Ĉu la esperantistoj iam deziros realigi la uzon, tion ili decidos. IVE nur prezentas, ĉi tie kiel aliloke, interesan problemon kaj indikon

pri eblecoj.

Doktoro Solzbacher bonvolis indiki nombron da nebonaj difinoj kaj eraroj diversaj. Pro multaj teknikaj malfacilaĵoj, la preseraroj sumiĝas al ne malgranda nombro (ekzemple, estas almenaŭ unu eraro en 24 el la 612 priskriboj sub la bildoj). Kvankam mi opinias ke en recenzo estas plej bone pritrakti la tekston, kaj ne preserarojn kiujn povas facile trovi ĉiu leganto, mi nenion pli diras pri la tradicio de "preserar-kompilado" kiun daŭrigis D-ro Solzbacher.

Doktoro Solzbacher, tamen, iom intermiksas proprajn ŝatojn kaj preferojn kun efektivaj korektoj, sen averto al la leganto. Sendube (kiel mi jam menciis), li supozas ke la recenzleganto estas sufiĉe sperta por rekonii ilin. Ekzemple, "briko *de* sapo" estas formo opiniata ĝusta de la plej multaj esperantistoj, same, "ne estas lojala, perfide..." estas formo uzata de grandega parto de la esperantistoj, kaj, kiel montras la citaĵoj el la Biblio, formo preferita de Zamenhof dum la lastaj jaroj de lia vivo. *Ebl*, laŭ multaj esperantistoj (kaj la normala uzado) havas transitivan kaj netransitivan sencojn (ne tute bonaj terminoj, ĉi tie). Ĝi signifas, plimalpli, "povanta", "falebla" povanta fali, "lernebla" povanta lerni (i aŭ -iĝi), kc.

Samsence, Doktoro Solzbacher ne menciis en sia recenzo, sendube supozante ke la leganto jam posedas la libron kaj konas ĝian enhavon, ke multaj el la kritikataĵoj estas speciale komentitaj en la libro mem. "Estunta," la alternativaj simboloj por la kemiaj elementoj, kc., ĉiuj estas klare komentitaj en la libro. Ekzemple, en la tabeloj, kiel ankaŭ ĉe la individuaj elementoj, estas donitaj la oficialaj kemiaj simboloj, krome, kun noto, la sugestitaj anstataŭigoj por interesperantista uzado.

Mi povus daŭrigi, sed mia deziro ne estas disputi kontraŭ D-ro Solzbacher, sed atentigi pri la naturo de IVE.

La tasko de leksikono ne estas ordoni, sed ekspliki, sugesti, komenti. La lingvo (ĉiu lingvo) evoluas per la ĉiutaga uzado, ne per la dekretoj de libroj aŭ individuaj personoj. IVE klopodas plenumi la taskon de leksikono esperanta, altkvalita. Ĝi antaŭsupozas, atendas kaj volas, ke la legantoj trovi en ĝi legitimajn informojn pri jama uzado (kaj nenio en ĝi estas netrovebla en la jama uzado, kvankam multaj el ĝiaj informoj temas pri maloftaĵoj, kompreneble). Estas la tasko de la leganto, la sperta esperantisto, uzi la lingvon. Se li kutimas uzi vorton, li ĝin pluuzos. Se li ne kutimas ĝin uzi, kaj ne trovas ĝin kutime en la uzado, li kompreneble ĝin nek uzu nek uzos. Sed se li ja iam trovos ĝin (kaj tiel iam estos), kaj deziros informiĝi pri la signifo aŭ gramatika formo, li rajtas trovi ĝin en la leksikono.

Kiel multaj el vi eble scias, ekzistas du partioj en la kampo de interlingvistiko, la "naturalistoj" kaj la "skematistoj". La naturalistoj preferas vortformojn, kaj derivadon, kiuj plej similas la vortojn en la naciaj lingvoj. La skematistoj preferas vortojn kaj derivadon logikajn, "aŭtonomajn". Ambaŭ partioj estas aktivaj en la nuna epoko de Esperanto.

Por naturalisto, la vorto "bigamio" estas derivaĵo el "bi-", "gam-", "i", kaj "-o". La fakto ke neniu el la tri unuaj radikoj ekzistas sendepende en Esperanto, kaj ke la vorto ne estas tre logika ("du-edziĝ-okupo" se mi tradukus laŭradike) ne ĝenas la naturaliston.

Por skematisto, "bigamio" ne estas derivaĵo, sed aŭtonoma vorto. Li

ridas (kiel ridas—kaj mi opinias ke prave—D-ro Solzbacher) pri la klopodoj de la naturalistoj fari nelogikajn derivaĵojn, uzi pseŭdoafiksojn, kc.

Tamen, denove, IVE, la leksikono esperanta por esperantistoj, devas registri la preferojn de ambaŭ skoloj, kiuj estas tre fortaj. La uzanto de IVE plejparte trovas ke tia vorto estas listigita dufoje, unufoje kiel aŭtonoma vorto (por la skematistoj), unufoje kiel derivaĵo (por la naturalistoj). Denove, kiu apartenas al unu skolo povas ignori la helpilojn donitajn por la alia. Sed la leksikono estas leksikono por la tuta esperantistaro, ne por nur parto, kaj devas registri ĉion.

Kiel D-ro Solzbacher, ankaŭ mi tre bedaŭras la okazajn erarojn kiuj tiel eniĝis fojfoje. IVE estas la unua provo, iam farita, de vera leksikono esperanta. Ĝis nun ĉiuj "vortaroj" estis aŭ nur vortlistoj, kun tradukoj (kiel la verkego de Wuester, kiu ne donas difinojn) aŭ arbitre elektitaj difinoj (kiel la P. V.) ignorantaj la uzadon.

Kontraŭe al D-ro Solzbacher, mi ne opinias ke la libro profitus per kelkaj jaroj pli da atendo kaj prilaboro privata. Tute male, la publikeco estas bezonata. La bonvola laborado de la tuta esperantistaro, la uzantoj mem, estas necesa por perfektigi la verkon.

Ni bedaŭras la relative malmultajn lingvoerarojn (t.e. verajn erarojn). Tiuj eraroj korektiĝos antaŭ ol aperos la dua eldono, kiu aperos post kelka tempo. La spertoj kaj kritikoj ankaŭ ebligis al ni elimini ilin el la dua volumo, kiu aperos post malmultaj monatoj. Ke en la etimologioj kaj difinoj estas kelkaj tre gravaj eraroj, ni konscias. Ni tre bedaŭras pri ili.

Tamen, ni ne opinias ke nia celo estas utopia. IVE ne atingis sian celon, vere, sed ĝi jam iris 3/4 de sia vojo. Per la bonvola helpo de la esperantistaro ĝenerala, ĝi povos venki la restantan kvaronon.

IVE en sia nuna formo estas multrilate pli bona kaj utila ol iu ajn alia leksikono esperanta, por la sperta esperantisto. Ni scias ke ĉiu seriozulo volos akiri ekzempleron, kaj ni esperas ke kompetentuloj bonvolos noti kaj sendi al ni sugestojn, komentojn, kaj korektojn. Ilia kompenso estos la plej grava verko de la plej grava lingvo, IVE kaj Esperanto.

Pri la entrepreno "Infanoj de la Mondo", S-ino Blanche Parker informis nin pri sia aktiveco jene: "Mi skribis plenpaĝan leteron pri la afero al la ŝtatestroj de ĉiuj 48 ŝtatoj. Mi ankaŭ skribis leterojn al 29 infan-gazetoj kaj jam ricevis favorajn respondojn de *Child Life*, *Boy's Life* (skoltoj), kaj *American Girl* (skoltinoj). La infanfako de la *Ruĝa Kruco* ankaŭ interesiĝis, ĉar ili havas internaciajn programojn pri arto kaj korespondado."

D-ro J. B. Melo e Sousa, famkonata Esperantisto kaj pioniro de Esperanto el Brazilo nun loĝas en Usono. D-ro Melo e Sousa jam dufoje antaŭe vizitis Usonon: unufoje en 1910 kiam li kiel oficiala reprezentanto de Brazilo ĉeestis la Sesan Universalan Kongreson en Washington, D. C.; duafoje en 1950 kiam li kaj lia edzino faris vojaĝon tra Usono kaj ĉeestis la Kvardekan Kongreson de EANA. Lastatempe D-ro Melo e Sousa kaj edzino venis denove al Usono por pasigi unu jaron kun sia filo en Kalifornio, de kie ni ricevis de li belan leteron kun aliĝo al EANA kiel Membro-Patrono.

THE HARVARD WORLD FEDERALISTS

Present A Course in

ESPERANTO

FREE OF CHARGE

THE WORLD INTERLANGUAGE
Spoken by over 8 million people today

A Spoken, Written and Reading knowledge in Five Lessons

THURSDAYS: FEBRUARY 16, 23, MARCH 1, 8, 15
PHILLIPS BROOKS HOUSE, THIRD FLOOR, 8:00 P.M.

(Esperanto estas la moderna lingvo por la interfacia mondo. La studento facile lernas Esperanto kaj multe helpas komunajn interkomprenojn.)

Approved - Harvard World Federalists - March 1956

Afiŝo farita de S-ro Fuller kaj metita en pli ol 300 lokoj tra la Universitato.

gumento de "Interlingua" kontraŭ Esperantistoj estis, ke Interlingua estas pure lingvista afero, troviĝas en la manoj de sciencistoj pri lingvoj, Esperanto kontraŭe estas afero amatora, troviĝas en la manoj de diversaj stranguloj, kiuj faris el serioza afero de interlingvistiko iun duon-religian sekton, por kiu diversaj "ismoj" estas pli gravaj ol la lingvo mem. S-ro Fuller, kiu pasintsomere travojaĝis Eŭropon kaj trovis, ke Esperanto kiel lingvo estis por li tre utila, facile sukcesis pruvi praktikan valoron de Esperanto, kaj de lingvista vidpunkto ĝian superecon super Interlingua.

125 studentoj ĉeestis la unuan kunvenon. Post prelego de s-ro Fuller kaj prov-leciono de s-ro Alberg, oni vendis 75 ekzemplerojn de la libro "Esperanto: the World Interlanguage" kaj 24 ekz. de "Edinburgh" vortaro. Estis proponita kurso de kvin lecionoj, ĉiu po du horoj. Partoprenis la kurson 60 personoj. Pro la fakto, ke la kurson partoprenis nur studentoj kapa laŭ kaj spertaj pri la lingvoj, kaj ankaŭ pro la speciala metodo de s-ro Alberg, ĉiu partopreninto plene posedas fundamenton de Esperanto, orientiĝas pri diversaj gramatikaj problemoj kaj havas sufiĉan provizon da vortoj por libere legi facilajn tekstojn kaj daŭrigi memstare la studon de la lingvo.

Post la kurso organiziĝis E-grupo, kiu aranĝas kunvenojn kaj praktikas la lingvon. Ambicio de s-ro Fuller estas membrigi kiel eble plej multajn de ili en EANA, ĉar li prave opinias, ke se post la fino de kurso la nova Esperantisto ne estos forte ligita kun la movado, li facile "reanal-fabetiĝos".

Ĉe la Universitato Miami okazis meze de Februaro inform-kunveno pri Esperanto. Partoprenis ĝin ĉefe kandidatoj por instruistoj de lingvoj. *D-rino Lydia A. DeVilbiss* kaj *s-ro Milo Zvara* faris paroladojn pri kaj en Esperanto respektive kaj distribuis propagandilojn. Malgraŭ tio, ke Florido ne estas tro favora tereno por nia movado, la tieaj malmultaj samideanoj faras ĉion eblan por informi ĝeneralan publikon pri Esperanto.

S-ro F. Lee York, Florido, atentigis nin, ke li vidis en kinejo filmon kun fragmento pri disdonado de Biblio inter niaj soldatoj en Koreo. Inter diverslingvaj Biblio estis ankaŭ la Nova Testamento en Esperanto. S-ro York malavare subtenas EANA, kaj lia nuna propono estas, ke ĉiu membro donacu almenaŭ unu ekstran dolaron jare por propaganda laboro de la Centra Oficejo kaj por plibonigo de "Amerika Esperantisto". Vere post apero de *AE* 32-paĝa ni ricevis multajn gratulojn kaj mondonacojn de la gratulintoj. Ĉies deziro estas, ke *AE* estu digna reprezentanto de Usono en la tutmonda movado.

ESPERANTA KRONIKO

Esperanto ĉe Universitato Harvard: *S-ro Graham E. Fuller*, nova studento de la Universitato, kune kun *S-ro Robert Alberg*, instruisto, sukcesis interesigi lokan grupon de mond-federalistoj pri Esperanto, kaj poste aranĝis tre sukcesan Esperanto-kurson. La grundon por la kurso preparis diskuto en la gazeto "Harvard Crimson" pri Interlingua kaj Esperanto. La ĉefa ar-

La Esperanto-Societo de Milwaukee prezentis televide la 24-an de marto dekmintan informan demonstracion pri Esperanto, kiel parto de la WISN-TV programo, "Hobby House". La programo estis sub aŭspicio de la Milwaukee Publika Muzeo, kaj estis aranĝita de *S-ro Donn Brazier*, oficisto de la Muzeo kaj membro de la Societo. *S-ro Jarvis E. Bush*, prezidanto de la Societo, respondis al demandoj pri Esperanto, kaj *S-ro Jon B. Willarson* kaj *F-ino Cecile Pollatz*, sekretario kaj kasistino, respektive, sidis ĉe manĝotablo kaj interparoladis pri manĝaĵoj, manĝiloj, ktp.

Pli frue, la 2-an de marto, S-ro Bush paroladis pri Esperanto al la Internacia Klubo de Wisconsin State College en Milwaukee. Membroj de la Klubo, venintaj el multaj fremdaj landoj, pro persona sperto subtenis la asertojn de S-ro Bush pri utileco de neŭtrala lingvo.


La Societo kunvenas dusemajne en la YMCA en Milwaukee kaj havas dudek-tri agemajn membrojn. La kurso por novlernantoj rapide progresas, kaj tre kredeble pli ol dek sukcese finos ĝin en junio. La Societo eldonas interesan kaj amuzan dusemajnan bultenon por membroj kaj amikoj. Iu, kiu dezirus ricevi tiun ĉi bultenon dum jaro, sendu 25 du-cendajn poŝtmarkojn al S-ro Jon B. Willarson, Sek., Esperanto-Societo de Milwaukee, 5788 Milwaukee River Parkway, Milwaukee 9, Wisconsin.

Vizitis la Centran Oficejon lastatempe du eminentaj Esperantistoj el Eŭropo. *S-ro Ralph Harry*, Ĝenerala Konsulo por Aŭstralio en Svisujo vizitis mallonge dum li trapasis Nov-Jorkon, kaj *S-ro Lorcan O'buiginn* el Irlando, kiu estis survoje al nova laboro en Ottawa, Kanado.

Ni bedaŭras raportoj pri la morto de: *James E. Furay* la 20-an de Julio 1955 en Florido. S-ro Furay, eminenta persono en la informservo "United Press", interesiĝis pri Esperanto antaŭ iom pli ol dek jaroj. Li restis dum la jaroj plej fidela amiko kaj subtenanto de EANA. En Februaro 1956 mortis *J. W. Hope*, Vancouver, Kanado. Li estis veterano kaj pioniro de Esperanto kaj EANA.

Ges-roj Roy E. Holland, kies rondvojaĝo tra Eŭropo per Esperanto (vidu bildon malsupre) vekis tiom da intereso en ilia hejmurbo, raportis ke ili faris ĝis nun 22 paroladojn pri Esperanto kaj pri siaj spertoj antaŭ plej diversaj grupoj, kiel ekzemple kluboj en lernejoj, lokaj Internaciaj Klubo, loka filio de Amerika Asocio de Universitataj Virinoj, ktp. Ili kutime montras filmojn pri la vojaĝo kaj disdonas al interesuloj "slosilojn" de Esperanto. Ili ankaŭ prezentis la filmojn antaŭ membroj de lokaj Esperanto-societoj en Chicago kaj Milwaukee. S-ino Holland, sekretariino de la Esperanto-Societo de Ĉikago, sciigis ke la Societo regule kunvenas por ekzerci Esperanton. Kelkaj novaj membroj aliĝis lastatempe pro la kurso de Ges-roj Holland en YMCA, kaj la grupo nun estas okupata pri planoj por ebla prezento de televida programo pri Esperanto pere de la loka eduka televida stacio. Sukceson en la klopodoj!





Roger Paul Heller: Komencis lerni Esperanton en 1908 pro artikoloj kaj lecionoj en la "North American Review". Dum la jaroj 1910-1913 servis kiel Sekretario de la Nov-Jorka distrikto de EANA. Instruis diversajn kursojn de Esperanto kaj kunlaboris dum la jaroj kun la nun mortinta samideano *A. S. Mellichamp*. Laŭ profesio, inĝeniero pri elektro. Nun 67-jara daŭrigas siajn sciencajn studojn per analizo de la efiko de muziktonoj sur emocioj de bestoj.

Fenton S. Stancliff: Lernis Esperanton en 1906 per lecionserio en ĵurnalo. Kunlaboris pri eldono de la Enciklopedio de Esperanto. Pasigis centojn da horojen statistika laboro pri gramatikaj kaj afiksaj elementoj en la verkaro de Zamenhof. Verkis artikolojn pri statistikaj, sciencaj kaj muzikaj temoj por multaj Esperantaj gazetoj. Ankoraŭ aktive interesiĝas pri Esperanto, kaj lastatempe en letero skribis: "En la fono de mia menso mi havas scienc-fikian rakonton kun pluraj ĉapitroj, kion eble mi povos iam prilabori." Bravo, kaj ni atendas la rezulton!

Grace Randolph: Lernis Esperanton en 1909 en kurso de *Arthur B. Baker*. En 1910 ĉeestis la Sesan Universalan Kongreson en Washington, kaj tie konatiĝis kun D-ro Zamenhof kaj lia edzino. En 1914 vojaĝis al Eŭropo, kie ŝi estis gasto de Esperantistoj en Anglujo. Ŝi estis sur ŝipo survoje al la Universala Kongreso en Parizo, kiam la unua mondmilito eksplodis. Post unu nokto en Parizo, ŝi revenis al Londono, de kie per helpo de la famkonata Komisiono de

Hoover, ŝi sukcesis reveni al Usono en amasloĝejo de la unua revenanta ŝipo. Ĉeestis kongresojn de EANA, kaj ĉiam lojale subtenas la Asocion.

Carroll A. Holbrook: Unue interesiĝis pri Esperanto kiam li renkontis la nun mortintan samideanon *G. W. Lee* dum ĵurio-servo. Dum la jaroj la du fariĝis bonaj amikoj, interkorespondis kaj ĉeestis kunvenojn de la tiama Bostona Klubo. Ĉeestis la Sepan Universalan Kongreson en Antverpeno 1911, kio estas por li neforgesebla sperto. Dum la jaroj lojale kaj sindoneme subtenis la laboron de EANA.

F. M. Goodhue: Antaŭ 40 jaroj estis membro de la Bostona Esperantista Societo kaj desegnis por ĝi la glumarkon uzitan dum multaj jaroj. Tradukis Esperante kelkajn librojn. Nun denove troviĝas inter la membroj de EANA.

George A. Corson: Lernis Esperanton en la jaro 1910. Aktive laboris dum multaj jaroj en la Nov-Jorka Esperanto-Societo. Nun vivas kviete ekster Nov-Jorko, sed retenas viglan intereson pri Esperanto, kaj de tempo al tempo vizitas la Centran Oficejon de EANA.

Fred E. Hutchins: Unue interesiĝis pri Esperanto en la jaroj 1903-1906, kiam li trovis lecionojn en la ĵurnalo "Montreal Star". Kiam aperis la unuaj numeroj de AE, li tuj abonis ĝin, kaj depost tiam daŭrigis sian intereson pri Esperanto kaj FANA.

Andrew I. Rogus: Lernis Esperanton 1920-1921 en rondo de Polaj studentoj dum studado ĉe Universitato Valparaiso. Gvidis kursojn de Esperanto en South Bend, Indiana, en Detroit, kaj en Philadelphia. Ĉeestis kvar kongresojn de EANA. Nuntempe loĝas en Brooklyn, N. Y., kaj aktive kunlaboras en la Esperanto-Societo de Nov-Jorko, kies prezidanto li estas.

KOMENTOJ DE S-RO AZORIN SENDITAJ KUN REKLAMO PRI I.V.E.

"Ilustrita Vortaro de Esperanto"

Zamenhof, en 1887, internaciigis la vortojn ordinarajn. Lineo (Carl von Linné) antaŭe internaciigis la nomaron de plantoj kaj bestoj. Ambaŭ lingvaj sekcioj tuŝiĝas, nature, kaj kiam IVE esperantigis unuafaje milojn da zoologiaj kaj botanikaj nomoj, laŭ regulo 15 de PG, ĝi trovis iujn vortojn natursciencajn en la Fundamenta Radikaro, kaj nur en 5 montriĝis jenaj diferencetoj.

DELFeNo, en la Fundamenta Radikaro: *A. dolphin, F. dauphin, G. Delphin*, kaj *Po.R. kiel H.Sv. delfin, L. (science) delphinus*. Por PV ĝi estas "mara mambesto el fam. de balenoj." Ĉar la radikvorto estas fundamenta, ni ĝin respektis; nature, ne la eraran difinon. Tiel ni diris sube.

DELFeNo: 1. Zoologie, genro de mambestoj cetacaj el fam. delfinida. 2. Ĉiu mambesto el tiu genro. 3. Titolo nobela. 4. Suda kunstelaro. 5. Genro botanika de herboj renonkulacaj. 6. Planto el tiu genro. 7. Verd-kolora pigmento el tiu vegetalo. 8. Griza mineralo epidota. Ni povus apliki la formon Delfino, nur por la sep sencoj novaj, sed kial ne diri, pro timo al kritikantoj, ke la nomo zoologia pli proksimiĝas al Delfino ol al Delfeno?

FRINGo kaj FRINGELo, (*L. fringilla*), estas por PV, la unua "paser-birdo kun varikoloraj plumoj", kaj la dua, "G. el paserbirdoj". Kaj PV aldonas naive, ke ĝiaj "teknikaj vortaristoj ne interkonsentas pri la preciza signifo de tiu vorto". Nia IVE respektas la vortojn fundamentajn, Fringo kaj Fringelo, sed aldonas: FRINGILo = Zoologie, genro de birdoj paserordaj el familio fringilida, kaj ĉiu birdo el tiu genro. Tio estas eble atenco al teknikaj vortaristoj de PV, sed ne al Fundamento.

Simile okazas al CEJANo-CIANo (*L. cyanus*), kaj al AJLo-ALIo (*L. allium*). Tamen, la Akademio instigata de aŭtoro rivala al IVE, proponas kondamni la kvin sciencismojn kun la libro eĉ, ĉar, pli zamenhofa ol Zamenhof mem, kiu permesis tion bonsense kaj klare, ili estas "novaj, elpensitaj formoj".

—Francisco Azorin

ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

Unua volumo A-K

666 paĝoj, grandformataj, 7" x 9½" (17 x 23 cm);
612 ilustraĵoj; 20,200 difinitaj vortoj;
deklingva kaj etimologia klarigo de ĉiu ĉefvorto;
miloj da ekzemploj, plej ofte zamenhofaj.

\$7.00 *bindita*; \$6.50 *broŝurita*; *afrankite*

Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondekupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Brazilo.** Moacyr Vitale, Rua Joaquim Nabuco 4, *Salto* (Est. de S. Paulo). Deziras korespondi kun geaktoroj.
- Francujo.** F-ino Michelle Rumaux, *Fos-sur-mer* (B. du Rh.). Deziras korespondi kun Amerikanoj.
- Germanujo.** Wilhelm Löwer, 16 *Elgerhausen* bei Kassel. Sendu bele a frankitajn PK, let., broŝ., gazetojn por ekspozicio kaj letervespero. Ankaŭ deziras korespondi.
- Hispanujo.** José M^a Auset, Salamero 25, *Graus* (Huesca). Deziras korespondi kun Usonanoj kaj interŝanĝi PM.
- Hispanujo.** Antonio Torres Martinez, Alto, num. 62, 1^o, *Cartagena*. Deziras korespondi kun gesamideanoj en Usono.
- Japanujo.** Sukenob Fukudome, ĉe Baikadoo Yakuhin, 16 Harimaya-choo, *Koochi-urbo*, Shikoku. Deziras korespondi.
- Japanujo.** Kiniĉi Uedo, Koŝien 9, *Naruo*, Niŝinomija. 18-jara studento, Baptisto, dez. kor. kun samaĝaj ge-kristanoj en Usono.
- Portugalujo.** F-ino Maria Gabriela Amorim, R. Alex. Herculano 82, *Torres Novas*. Deziras korespondi per il. PK.
- Portugalujo.** Manuel Batista D. Vermelho, Rua Miguel Pais 110, *Barreiro*. Donas informojn pri naturkuraciloj.
- Svedujo.** Erik Bengtson, Ljunghokmsvägen 19, *Falkenberg*. Deziras korespondi kaj interŝanĝi PK kun Usonan(in)oj.
- Svedujo.** Kerstin Rönnelid-Ström, Sveavägen 8 A, *Värnamo*. Sveda patrino kun dujara kaj sesjara filinoj deziras korespondi kun patro aŭ patrino por interŝanĝi infanobjektojn.
- Svedujo.** Eric Castell, Postfack 62, *Ryd*. Deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.
- Usono.** Patrick Griffin, 3289 Granville Ave., *Los Angeles* 66, California. Studento, 15-jara, dez. kor. pri astronomio, kaj dez. interŝ. monerojn, PK, PM. Certe respondos.
- Usono.** Gregory J. Nunz, Box 109, *Boron*, California. 22-jara inĝeniero deziras korespondi kun junulino en Francujo.
- Usono.** Peter Tan, Luther College, *Decorah*, Iowa. Ĉina studento deziras korespondi kun samideanoj tutmondaj.
- Usono.** F-ino Barbara Moscarello, Shonghum Mountain Sanitarium, *Morristown*, N.J. partoprenos la kunvenon de medicinaj teknikistoj en Quebec Kanado, la 17 ĝis 21 de Junio. Deziras kontakti kun aliaj partoprenontoj de tiu kunveno.

"La Filatelisto", a bulletin for philatelists and general correspondence. Published in France, bimonthly, 20 pages, it lists in each issue several dozen addresses of correspondents throughout the world. Anyone who wishes contact with the world and wishes to find pen-pals or the possibility of small business exchange abroad, will find this bulletin useful. Subscription for the year only \$.85. Add 10c for airmail transfer. Send your order to: *Esperanto, 114 W. 16 St., New York, N. Y.*

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

PRACTICAL ESPERANTO , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
REED'S PRACTICAL GRAMMAR , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
COURS PRATIQUE D'ESPERANTO , preface by Th. Cart. Complete text in French with exercises, Partie Élémentaire & Supérieure, 2 vols, 239 pp...	1.45
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	2.00
ESPERANTO (World Language Series) , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
WORLD'S CHIEF LANGUAGES , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
EDINBURGH DICTIONARY , Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	2.50
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
PLENA VORTARO DE ESPERANTO , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The new latest edition, all-Esperanto dictionary with <i>Suplemento</i> , 511 pp., 4x5½.....	Cloth 3.35
SUPLEMENTO AL PLENA VORTARO , separate edition, 6x8 in., 63pp.....	1.25
FUNDAMENTA KRESTOMATIO , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.85
Latest edition, with additional foot-notes, etc., de luxe printing,.....	Cloth 3.15
KARLO , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp....	.25
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio) . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
ESPERANTO SORTIMENTO . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgolino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Argenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miŝerere</i> , music story, & <i>Thais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romane, Serba, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
INDIAN BEAD STAR . Genuine "Kiowá" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
GREEN STAR PENDANT . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia...	.75
ENAMEL GREEN STAR . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "*Vinylite*" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only* \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only* \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.